

**LA FILO DE LA HOMO VENIS POR DONI SIAN VIVON POR LIBERIGO DE LA HOMOJ - Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Marko 10, 35-45**

En tiu tempo, Jakobo kaj Johano, la filoj de Zebedeo, alproksimiĝis al Jesuo, kaj diris: "Majstro, ni deziras, ke Vi plenumu por ni tion, kion ni petos de Vi." Kaj Jesuo demandis: „Kion Mi faru por vi?“ Ili respondis: „Kiam Vi estos en Via glora regno, disponu, ke ni sidu unu dekstre kaj la alia maldekstre de Vi.“

Sed Jesuo diris: „Vi ne scias, kion vi petas! Ĉu vi povas trinki la suferkalikon, kiun Mi trinkos? Aŭ ricevi tiun sangan bapton, per kiu Mi estas baptota?“

Ili respondis: „Ni estas pretaj.“ Kaj Jesuo: „Jes, ankaŭ vi trinkos mian suferkalikon kaj ricevos mian bapton; sed Mi ne povas decidi pri honorlokoj de tiuj, kiuj estas kun Mi. Ili estas por tiuj, por kiuj Dio ilin pretigis.“

La aliaj dek disĉiploj, aŭdinte tion, kion Jakobo kaj Johano petis, ekkoleris kontraŭ ili.

Tiam Jesuo alvokis la disĉiplojn al si, kaj diris: "Vi bone scias, ke Tiuj, kiuj estas taksataj popolregantoj, ordonas kiel neflekseblaj estroj, kaj opresas la subulojn. Sed inter vi ne estu tiel. Eĉ, se iu volas esti granda inter vi, li estu ĉies servisto; kaj kiu volas esti la unua, estu ĉies sklavo. Fakte, ankaŭ la Filo de la homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj."

La malamiko de Dio, laŭ la evangelioj, ne estas la peko, de kiu la Sinjoro povas liberigi, sed la povo. Dum Dio estas amo, kiu servas la homojn, la povo estas regado kiu ilin opresas. Tion montras tiu ĉerpaĵo el la evangelio de Marko, 10-a ĉapitro, versikloj de 35 ĝis 45. Antaŭ tio estis la tria, kaj fina, anonco de la morto de Jesuo en Jerusalemo.

Sed la disĉiploj estas surdaj kaj blindaj. Pelate de ambicio kaj vanteco, ili ne komprenas la vortojn de Jesuo. Skribas la evangeliisto, ili *alproksimiĝis al Jesuo*,... kaj tio montras, ke ili estis malproksimaj, ili akompanas lin, sed ne kapablas lin sekvi.

*Jakobo kaj Johano*, la du disĉiploj nomataj "la idoj de la tondro", ordonemaj, *la filoj de Zebedeo*, diris: *Majstro...*, *Majstro* estas iu, de kiu oni lernas, sed ili ne lin aŭskultas, ĉar ili ne lin sekvas Ni deziras, ke Vi plenumu por ni tion, kion ni petos de Vi.". Post la dua anonco de la pasiono, Jesuo estis dirinta: "Se iu volas esti la unua, li estu la lasta kaj ĉies servanto".

Male, nun ili volas esti la unuaj ne estinte la lastaj. „Kion Mi faru por vi?" Ili respondis: „Kiam Vi estos en via glora *regno*, *disponu*, ke ni sidu unu dekstre kaj la alia maldekstre de Vi."

Ili opinias, ke Jesuo eniros Jerusalemon kaj akiros la povon, kaj por si ili volas la honorlokojn, la lokojn plej gravajn, unu dekstre kaj unu maldekstre, por regi kun Li. Ili komprenis absolute nenion el tio, kion Jesuo triafoje kaj lastafoje anoncis. Jen la respondo de Jesuo. „*Vi ne scias, kion vi petas!* "Ĉu vi povas trinki la suferkalikon, kiun Mi trinkos...?" La kaliko reprezentas la destinon, la morton trapasotan de Jesuo. "*Kaj esti baptitaj...*, kaj la verbo "bapti" ankoraŭ ne havas la signifon de la sakramento, sed signifas "enmergiĝi", kaj la signifo de la frazo estas "kaj enmergiĝi tien, kien enmergiĝis Mi".

Kaj ŝajnas, ke la eventoj surprizas Jesuon, kvazaŭ enmergigo. Arogante, *Ili respondis: „Ni estas pretaj."* En la postaj ĉapitroj la evangeliisto raportos, ke en la momento de la pruvo, de la mergiĝo en la bapton, ĉiuj disĉiploj malaperis.

*Kaj Jesuo: „Jes, ankaŭ vi trinkos mian suferkalikon kaj ricevos mian bapton;* tio signifas, ke ankaŭ ili suferos persekuton kaj mortigon *sed ne povas decidi Mi pri honorlokoj de tiuj, kiuj estas kun Mi. Ili estas por tiuj, por kiuj Dio ilin pretigis."*

Por kiuj estas pretaj tiuj lokoj?. Por tiuj, kiuj ĉe la pruvo kapablos Lin sekvi. Inter ili ne estos tiuj ĉi, sed tiuj, kiuj kapablos surpreni la krucon kaj sekvi Jesuon. La peto de la du indignigas la aliajn dek. Skribas Marko: "*La aliaj dek disĉiploj, aŭdinte tion, kion Jakobo kaj Johano petis, ekkoleris kontraŭ ili. Sed tiu kolero ne estas vera indigno: simple ĉiuj deziras la samon: esti la unuaj, la ĉefuloj. Tial ili koleras kontraŭ tiuj kamaradoj, kiuj tiun deziron esprimis unuaj.*"

Ankaŭ nombro dek ne estas menciita hazarde. Ĝi aludas la granda skismon, kiu ĉesigis la Israelan regnon: tuj post la morto de Salomono, lia filo Roboamo, al la tribestroj postulantaj, ke li superu sian patron, respondis ege arogante, kaj de tiam dek triboj forlasis la Israelan regnon, kaj restis nur du. Sekvis la skismo kaj la kolapso.

Do la evangeliisto intencas komprenigi, ke ambicio kaj vanteco, se ili dividas la kristanaron, povas ĝin ruinigi. *Tiam Jesuo alvokis la disĉiplojn al si ... Li ilin vokas, ĉar ili malproksimas, kaj diris: "Vi bone scias, ke tiuj, kiuj estas taksataj popolregantoj (ne ĉiam tiaj ili estas), ordonas kiel neflekseblaj estroj, kaj opresas la subulojn".* Do laŭ Li ili estas tiranoj. Kaj trifoje Jesuo diras: "*Sed inter vi ne estu tiel.* Neniu imito de la rangostrukturo kutima en la homa socio rajtas ekzisti en la kristana komunumo. En ĝi ne estas distingo inter ordonantoj kaj obeantoj, sed familia strukturo, en kiu ĉiuj vivas por la bono kaj feliĉo de la aliaj

Jesuo tion emfazas trifoje, dirante: "*Sed inter vi ne estu tiel. Eĉ, se iu volas esti granda inter vi, li estu ĉies servisto; kaj kiu volas esti la unua, estu ĉies sklavo. Fakte, ankaŭ la Filo de la homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj.*". Sklavo estas la plej malalta rango en la socio. Kial tio? Ĉar Jesuo estas la filo de Dio, estas mem Dio, kaj Dio estas amo kiu iĝas servisto kaj sklavo de la homoj. Pere de Jesuo, Dio ne postulas servadon, sed iĝas servanto de la homoj. Kiuj volas kunesti kun tia Dio, devas distingiĝi per servado libere plenumata pro amo.